# *Festo de la okuloj: 41-a Internacia KinFestivalo Latinamerika de Havano*




La kuba ?efurbo sin preparas por okazigi la 41-an latinamerikan kinofestivalon, evento kiu konsistigas kulturan manifestacion tre ?atatan de la kubaj kinoamantoj.

De la 5-a ?is la 15-a de decembro, la kinofestivalo sesios en la kuba ?efurbo kaj ?i estos aparte dedi?ita al la kinofaristo kaj dokumentisto kuba, Santiago Álvarez.

La festivalon a?spicias la ministerio de kulturo kaj la kuba instituto de arto kaj kinematografia industrio, krom aliaj institucioj eksterlandaj kiel la flugkompanio Copa airlines.

La kinofestivalo de Havano klopodas arigi la plej bonan de la regiona kinoarto dum la jaro, kaj ?i atestas pri la realo kiu kreas ?in.

?i-jare la organizantoj transdonos honoran koralpremion al la kuba kinofaristo Manuel Pérez, gajninto de la nacia premio de kinoarto, kaj anka? al la argentina produktistino Lita Estantic, unu el la emblemaj kinofaristoj de la nova argentina kinoarto de la na?dekaj jaroj.

Sendube, la 41-a eldono de la internacia kinofestivalo de Havano, estas granda festo por la kinoamantoj, kiuj dum 10 tagoj povos ?ui la plej kvalitan filmografion de latinameriko, krom aliajn prezentojn de invititaj landoj de E?ropo kaj Usono.

Same okazos fakaj libroprezentoj, ekspozicioj, teoriaj debatoj pri kinoarto en la regiono kaj aliaj kulturaj programeroj. Kiel ?iujare, pluraj miloj da kubanoj kaj vizitantoj plenigos la kinejojn de Havano por ?ui la feston de kinoarto en la kuba ?efurbo kiu da?re festas sian 500-an jubileon.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/208784-festo-de-la-okuloj-41-a-internacia-kinfestivalo-latinamerika-de-havano

**Radio Habana Cuba**